

Informilo de Majo 2018

Numero 34, majo 2018

Universala Esperanto-Asocio elektiĝis al la estraro de CoNGO



Genevo, 15 aprilo 2018. En sia jarkunveno en Genevo en marto, la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj (mallonge: CoNGO) elektis UEA al sia estraro por la periodo 2018-2021. Tiel, nia Asocio kunlaboras kun 17 aliaj grandaj internaciaj NROj rolantaj kiel la voĉo de organizaĵoj aliĝintaj al la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de Unuiĝintaj Nacioj. Sub la gvido de sia prezidanto, Liberato Bautista, kiu laboras en Novjorko, la celo de CoNGO estas faciligi la partoprenon de NROj en la UN-sistemo. Ĝia estraro kunvenas rotacie en Novjorko, Genevo kaj Vieno, kie UEA estas reprezentata de, respektive, prof. Humphrey Tonkin, Stefano Keller, kaj prof. Hans-Michael Maitzen. UEA aparte aktivis en du komitatoj de CoNGO – pri paco (Vieno) kaj pri edukado (Novjorko).

“Tiu ĉi rekono de la internacia aŭtoritato de nia Asocio estas grava mejloŝtono en niaj klopodoj labori pli intime kun la familio de Unuiĝintaj Nacioj,” d-ro Tonkin komentis. “Ni antaŭĝuas nian kunlaboradon kun CoNGO nome de, kaj kunlabore kun, internaciaj NROj tra la mondo.”

Inter la organizaĵoj-estraranoj de CoNGO troviĝas Soka Gakkai Internacia, la Internacia Alianco de Virinoj, Soroptimist International, la Internacia Humanista kaj Etika Unio, kaj la Internacia Unio de Psikologia Scienco.

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Familioj 2018 proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. 15 majo 2018

Novjorko, 15 majo 2018. La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Familioj estas “Familioj kaj inkluzivaj socioj.” Nome de la miloj da Esperanto-parolantaj familioj, kiujn ĝi bonvenigis inter si tra la jaroj, Universala Esperanto-Asocio esprimas sian daŭran sindediĉon al socia inkluzivo de ĉiuj familianoj, protekto de iliaj homaj rajtoj, kaj helpo al ĉiuj anoj de familio tra la mondo kiuj, laŭ la spirito de la 16-a Celoj por Daŭripova Evoluigo, “Paco, Justeco kaj Fortaj Institucioj”, serĉas helpon de la internacia komunumo por elteni dislokigon, militon, ekstreman malriĉcon, kaj malsanon. Multaj tiaj familioj estas malhelpataj esprimi siajn bezonojn pro lingvaj bariloj, manko de aliro al edukado, kaj socia marĝenigo.

Ekde sia fondiĝo en 1908, nia Asocio laboras por transponti la dividojn inter homoj kaj nacioj. Ne malofte, tiuj agadoj kondukas al internaciaj geedziĝoj kaj la starigo de familioj kies infanoj ĉehejmas en pli ol unu kulturo. Antaŭ cent jaroj, meze de la Unua Mondmilito, la juna Asocio laboris, el sia sidejo en la neŭtrala Svislando, por utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel ilon por reunuigi familiojn dividitajn de la milito, kaj por starigi kontakton kun familianoj izolitaj de siaj parencoj. En pacaj periodoj, ni celis disvastigi la lernadon kaj instruadon de Esperanto kiel vojon por malfermi la mondon al infanoj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj egale; al ĉiuspecaj familioj, ĝi reprezentas unikan manieron por partopreni en internacia komunumo ligita per vojaĝado, literaturo kaj aliaj komunaj spertoj. Hodiaŭ la Asocio organizas ĉiujaran tutmondan renkontiĝon de Esperanto-parolantaj infanoj, kaj niaj aliĝintaj asocioj en pluraj landoj aranĝas ĉiujare kunvenojn de Esperanto-parolantaj familioj. La temo de la nuna Internacia Tago de Familioj estas sekve aktuala kaj laŭtema al la internaciaj defioj kiujn niaj membroj klopodas fronti tra la mondo responde al la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

En la hodiaŭa tago, en mondo kie multe tro da familioj estas dividitaj aŭ dislokitaj de milito kaj politika subpremo, kie multe tro da familioj vivas en malriĉeco aŭ sub minaco de malsano, kie multe tro da familioj vane serĉas ekvilibron inter laboro kaj familio, ni esprimas nian firman deziron, nome de ĉiuj parolantoj de Esperanto, labori por pli sana, pli egaleca, pli tolerema kaj pli paca mondo en kiu la familia vivo estu plifortigita en maniero kiu avantaĝas ĉiujn familiojn kaj ĉiujn individuajn familianojn.

UEA sponsoris simpozion pri multlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Novjorko, 12 majo 2018. Kion oni povas fari por antaŭenigi multlingvismon en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj? Kiel tio farus UN-on pli efika? Jen demandoj levitaj en lastatempa simpozio pri multlingvismo organizita de la Studogrupo pri Lingvoj kaj UN. Partoprenantoj interkonsentis, ke la lingvaj bezonoj de UN etendiĝas preter la tradukado kaj interpretado de ĝiaj ses oficialaj lingvoj, sed ke tiuj pliaj bezonoj ne ricevas sufiĉan atenton. Nek plene realiĝas la tuta lingva potencialo de UN.

En larĝa diskutado, UN-personaro, diplomatoj, neregistaraj organizaĵoj kaj universitatanoj ĝenerale samopiniis, ke, por plene realigi sian celon de engaĝado de civila socio, kaj por eniri konstruan dialogon kun siaj diversaj publikoj, UN devas alfronti siajn eksterajn lingvajn prioritatojn kaj trovi la rimedojn por ilin plenumi. Simpoziaj partoprenantoj menciis packonservajn operaciojn, informservojn de UN, kaj, ĉefe, realigon de la Celoj por Daŭripova Evoluigo kiel terenojn kie necesas pli sistema agado por utiligi vastan gamon de lingvoj se oni vere deziras atingi sukceson.

La simpozio, okazinta en 777 UN Plaza, tuj apud la UN-ĉefsidejo, la 10-an kaj 11-an de majo 2018 malfermiĝis per podia diskuto inter kvar ambasadoroj: Martín García Moritán el Argentino, Rudolph Michael Ten-Pow el Gujano, Valentin Rybakov el Belorusio, kaj Narjess Saidane de la Internacia Organizaĵo de la Francparolanta Komunumo. Prezidis Igor Shpiniov de la Fako pri Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj. lasence reprezentante kvar el la ses oficialajn lingvojn (hispanan, anglan, rusan, francan), la kvar podianoj traktis klopodojn atingi egalecon inter la ses lingvoj, emfazante la mankon de rimedoj kaj la kreskantajn postulojn pri lingvaj servoj.

Sed la diskuto plivastiĝis.

“Ni devas ĉesi pensi pri multlingvismo kiel teknika demando,” deklaris Amb. Saidane. “Ĝi estas politika demando – pri la maniero laŭ kiu UN engaĝiĝas ĉe la bazo kun la diversaj homoj kaj kulturoj. Lingvoj estas manieroj de pensado kaj sciado.” “Kiom kostas multlingvismo

kompare kun la kosto de la manko de multlingvismo?” ŝi demandis.

Ni devas forlasi “kulturon de tradukado,” aldonis Amb. García Moritán, kaj akcepti mondon de multlingvismo, en kiu homoj estas maksimume liberaj esprimi sin per la propraj lingvoj.



[De maldekstre, Ambasadoroj García Moritán, Rybakov, Ten-Pow, Saidane, kaj s-ro Shpiniov]

Amb. Ten-Pow, el Gujano, atentigis, ke sub la gvido de la nuna Ĝenerala Sekretario la organizaĵo faras paŝojn al fortigo de lingva egaleco kaj al ŝanĝo de sia kulturo favore al pli forta konscio de multlingvismo. La aliaj podianoj samopiniis.

Amb. Rybakov, kies delegacio estis inter la iniciatintoj de la Internacia Tago de Tradukado, festata la 30-an de septembro ĉiujare, aldonis plian gravan dimension al la diskuto, atentigante pri la bezono de pli granda konscio, kaj internacia interkonsento, por protekti interpretistojn kaj tradukistojn en militaj zonoj. Same kiel ĵurnalistoj, lingvolaborantoj estas neŭtralaj partioj kiuj facile ofendas ambaŭ flankojn en konflikto. Ili meritas protektadon.

Ĉefparolanto en la simpozio estis Michele Gazzola, de la Universitato de Leipzig, fakulo pri lingva ekonomiko, kiu traktis lingvopolitikon en la Monda Organizaĵo pri Intelektua Proprieto kaj la Eŭropa Patenta Oficejo. Pli multlingva aliro al patentado helpus protekti intelektan proprietaĵon, li argumentis, kaj tiel la homaron. Ĝi havas sencon el ekonomia sed ankaŭ humana vidpunkto.

Inter aliaj organizaĵoj kies lingvaj politikoj oni ekzamenis en la simpozio estis ASEAN (Asocio de Sudorient-Aziaj Nacioj), la Internacia Kriminala Kortumo kaj la Eŭropa Unio.

En la dua tago de la simpozio, podia diskuto prezidata de prof. Rosemary Salomone (de la jura fakultato de St. John's University), konsistis el Guillaume Dabouis el la eŭropunia delegacio, Mekki Elbadri el la arablingva sekcio de la fakulo pri dokumentado de UN, Jean-Victor Nkolo el la Oficejo de la Speciala Konsilanto pri Afriko, la direktoro de la oficejo de Unesko ĉe UN Marie-Paule Roudil, kaj Russell Taylor el la fakulo pri publika informado de UN. Substrekante la atingojn de la lingvaj kaj eldonaj servoj ĉe UN, la diskuto tamen traktis ankaŭ esencajn strukturajn mankojn. Per pli grandaj rimedoj la oficistoj pri publika informado povus atingi pli vastan publikon, laŭ s-ro Taylor. S-ino Roudil atentigis, ke Unesko forte subtenas patrinlingvan edukadon, sed ke multaj infanoj ankoraŭ estas malhelpataj lerni en sia denaska lingvo. Surbaze de sia vasta sperto pri packonservaj operacioj de UN en Afriko, s-ro Nkolo emfazis la nepran gravecon, ke UN havu kompetentulojn pri lokaj lingvoj en ĉiuj tiaj operacioj.

Referaĵoj prezentitaj dum la simpozio traktis interalie gestolingvojn, komercan multlingvismon, la lingvon de instruado en universitatoj, kaj la rolon de la lingvo en agentejoj por ensociigi rifuĝintojn. Raporto de Red T, neregistara organizaĵo fondita por antaŭenigi protekton de la sekureco de interpretistoj kaj tradukistoj, refortigis la mesaĝon jam liveritan de Amb. Rybakov el Belorusio.

Cento da homoj partoprenis la simpozion. La Studogrupo planas daŭrigi sian laboron por konsciigi Unuiĝintajn Naciojn pri la graveco de multlingvismo. Substrekante la bezonon de dudirekta komunikado kaj eĥante unu el la sloganoj de la Celaro por Daŭripova Evoluigo akceptita de la Ĝenerala Asembleo en 2015, Humphrey Tonkin, kiu prezidis la simpozion, rimarkigis, ke “Ni ĉiuj scias kiel diri ‘Neniu postlasiĝu’ en la angla, sed ĉu ni povas ĝin diri en la tvia aŭ la guĝarata aŭ la gvarania – la lingvoj de la homoj kiujn ni laŭsupoze servas? Kaj ĉu ni povas kompreni, aŭ eĉ aŭdi, la postlasatojn kiam ili alparolas nin?”

La simpozion sponsoris la Centro por Aplika Lingvistiko (Vaŝintono), Birkbeck (Universitato de Londono), la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj ties revuo *Language Problems & Language Planning*, Universala Esperanto-Asocio, kaj Esperantic Studies Foundation.

Pliaj informoj haveblas ĉe www.languageandtheun.org.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

[1] 212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041